# *Fremdaj investoj en Kubo: enradiki?o kaj kresko*




Fremdaj investoj estas afero de maksimuma graveco por Kubo. ?iaj gvidlinioj estas preskribitaj en la ?efaj dokumentoj de la partio, de la ?tato kaj de la Konstitucio de la respubliko.

?i-lasta starigas en sia artikolo 28, ke la ?tato impulsas kaj donas garantiojn al la fremdaj investoj, kiel grava elemento por la ekonomia progreso de la lando, surbaze de la protektado kaj racia uzo de la rimedoj homaj kaj naturaj, samkiel respekto al suvereneco kaj sendependeco naciaj.

Tio signifas ke la reguloj estas klaraj. Ekzistas politika volo de la ?tato kuba por avancigi tiun ?i sferon. Precize tial, la malamikoj de la Revolucio ?in atakas kaj la usona registaro kreas kaj solidigas ?iuspecajn obstaklojn kaj kampanjojn por timigi eblajn investantojn, kaj premi tiujn, kiuj laboras en Kubo.

Tiu ?i nuna situacio estas kompleksa pro la negativaj sekvoj de la usona registaro en tiu ?i agado, kaj aparte, pro la apliko iliaflanke, de la tria titolo de la nomata le?o Helms-Burton, funkciigita de la nuna administracio, kio aldonas minacojn al fremdaj investontoj.

Pri tio la direktorino de fremdaj investoj en Kubo, Débora Rivas, esprimis ke la nuna usona administracio reduktis la eblecojn komerci kun Kubo nur al produktoj, kiuj povas enhavi usonajn komponentojn, maksimume ?is 10%. Tio signifas ke multaj teknologioj, kiuj posedas pli ol 10% de usonaj elementoj, estas malpermesataj por Kubo, kaj tio senigas la insulon je multaj produktoj kaj

altnivelaj teknologioj.

Pro tio, kiam Trump asertas ke li helpas tiamaniere la kuban popolon, tio estas falsa?o totala, ?ar la kubanoj rekte suferas ?iujn punojn altrudatajn de la usona registaro al nia ekonomio.

Malgra? tio, pluraj investistoj esprimis sian intereson kaj venis al Kubo por investi. La sektoroj kiuj ricevis pliajn investojn estas turismo, unualoke, industrio, agrokulturo, nutra?oj, renovigeblaj energioj kaj la lo?istika sektoro, interalie.

Oni kreis departementon konatan kiel Unika gi?eto,  kiu aprobos pli rapide la koncernajn projektojn. Tio devas rapidigi tiujn burokratajn procezojn kaj ebligos kaptadon de pliaj negocoj. Tiel ke fremdaj investoj en Kubo celas enradiki?i kaj kreski.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/economia/214059-fremdaj-investoj-en-kubo-enradikigo-kaj-kresko

**Radio Habana Cuba**